

Aŭstraliaj Esperantistoj

Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale
PLENUMITA 17/09/2020 Kvarcentnaŭdekseca eldono (unua eldono 20/09/2011)



Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au



Entute **741,900** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **288,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **226,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **211,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun studas **16,900** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020)


Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde novembro 2020 ?)



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

EKSTRAĴOJ ĈE LECIONO 2 DE "THE ESPERANTO-TEACHER".

N.ro 2 de "Por Komencantoj".



EKSTRAĴOJ ĈE LECIONO 2 DE "THE ESPERANTO TEACHER".



Se vi volas kapabli paroli la lingvon pli baldaŭ, faru la jenon. Post kiam vi finis studi unu lecionon, rigardu la anglan tradukon en la fino de la libreto. Penu traduki ĝin al Esperanto, kaj post ĉiu frazo rigardu en la Esperanto-teksto de la ekzercaĵo en la leciono por vidi, ĉu vi pravis. Ĉe kelkaj frazoj vi faros erarojn kaj vi devas parole korekti ilin, ĝis vi pravas, kelkfoje plurajn fojojn. Vi praktikas tion ĝis vi fine povas legi la tutan anglan ekzercaĵon en senerara Esperanto. Sed vi devas fari ĉion parole laŭte, ĉe vi mem. Dum la kurso tio fariĝos pli malfacila, pro la pli malfacila gramatiko kaj ĉar vi devos memori pli da

vortoj. Sed ne cedu, ĉar je la fino de la kurso vi parolos Esperanton flue. Sed vi devas ĉiam diri la Esperantajn frazoj tre laŭte kaj klare. (daŭrigota) **Marcel Leereveld.**

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE



Surhavu vizaĝmaskon.

Unu terno povas elŝpruci ĝis 8 metroj.

<https://twitter.com/i/status/1245591199034929153>

Homoj protektas aliulojn per la surporto de masko

Protektilo por la **surportanto** sed ankaŭ por la **proksimuloj**

Roger Springer



Kevin Smith de Balgowlah (Manly) mortis. Lia filino telefonis min, sed mi ne havas detalojn. Li estis ano de la Manlia klubo dum multaj jaroj antaŭ ol li eniris maljunejon

Roger Springer



Kara Roger,

saluton el Eŭropo. Bonvolu trovi miajn pensojn rilate al la artikolo pri UBE en la AE495.

Mi pensas, ke la ideo de pago de UBE al ĉiuj civitanaoj estas bona, tamen nun tute ne estas realigebla en multaj partoj de la mondo. Amike via Gabor

KIU PAGU LA UNIVERSALAN BAZAN ENSPEZON?

En la AE495 aperis artikolo, kiu proponis ke oni pagu UBE-on por ĉiuj individuoj, sed la artikolo ne menciis, kiu devus pagi tiun monon. Mi supozas, ke la aŭtoro opiniis, ke la registaroj devus pagi tiun monon el la nacia buĝeto de sia lando. Sed tio ŝajnas esti tute ne realigebla en multaj landoj, ekzemple en Somalio (kaj ankaŭ en multaj aliaj malriĉaj landoj). Registara buĝeto estas dokumento preparita de la registaro kaj akceptita de la parlamento en kiu la landoj prezentas siajn antaŭviditajn enspezojn (hereda imposto, enspezimposto, kompania imposto, dogano, profito de ŝtataj kompanioj, ktp.) kaj la proponitajn elspezojn (sanprizorgo, edukado, defendo, vojoj, kosto de publika administrado, ktp.) por la venonta financa jaro.



https://en.wikipedia.org/wiki/List_of_countries_by_government_budget_per_capita montras, ke la pokapa buĝeto en Somalio estas 23 dolaroj jare. Tio signifas, ke la registaro povus pagi monate iom malpli ol du dolarojn al siaj ŝtatanoj kiel UBE, sed en tiu kazo tute ne restus mono por pagi salajrojn al oficistoj en la publika administrado (juĝistoj, policistoj, instruistoj en publikaj lernejoj, kuracistoj en publikaj hospitaloj, ktp.). Tio tute ne estas realigebla, pro tio mi pensas, ke la ideo de pago de UBE estas nur utopio en multaj partoj de la mondo.

D-ro **MARKUS Gabor** (el Hungario)



Respondo al Gabor

Jes mi scias ke estus problemoj trovi monon por la ube. Mi scias ke ekzistas multaj malriĉuloj en la mondo kaj ni, en la pli riĉaj landoj, havas pli bonajn riĉajn vivojn

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

pro tiu fakto. SED ĉu tio estas justa??
 Laŭ mi tiuj problemoj estas solveblaj. La Homaro estas inteligenta. Ĉu Ne?
 Unu solvo sekvas, sed eble estus aliaj vojoj.

From the Big Kahuna Website [morganfoundation](http://morganfoundation.org) NZ

<https://youtu.be/LjCbg-ZJWUc> <https://youtu.be/9liyfxLx5mQ>

enspezo pension imposto por vi

INCOME	UBI 10K	TAX 25%	POCKET
\$0	\$10K	0	\$10K
\$20K	\$10K	\$5K	\$25K
\$40K	\$10K	\$10K	\$40K
\$100K	+10K	\$25K	\$85K

enspezo de mono (*Income*)
 universala baza enspezo (*UBI*) estas pensio por ĉiuj
 imposto (*Tax*)
 uzebla mono en via poŝo

(*pocket*)

Video el novzelando pri unu universala baza enspeza propono
 Se vi ne komprenas la Anglan, la ciferoj supre estas tre informaj
 Notu,

Estas 3 kosmaj ŝipoj nun vojaĝantaj al Marso eĉ kiam en la malsanulejoj mankas bezonataj sanaparatoj kaj en aliaj mankas manĝoj kaj la malsanuloj eĉ malsatmortas
 Ne estas mona problemo. Estas ekonomisistema problemo.

Roger Springer



PLEJ GRAVA **Kio estas Mono?** Mono estas la havebla energio en la mondo.

Ĉu homa aŭ besta Laboro? La Suno? Vento? Gravito? ktp.
 Aldonatas ankaŭ la rezervejo de energio de antaŭaj jaroj Oleo? Gaso? Karbo? Atomo?
 Multaj homoj kredas ke mono nur rezultas de homa laboro. Ne Ne. Mono egalas energio.
 Do landoj ŝtelas, militas kaj trompas por posedi la energion por ŝanĝi landajn registarojn al la plej kompataj politikistoj por akiri ties energion.
 Kiel kovid-19 pruvas ke multegaj laboraj postenoj ekzistas nur por distribui monon inter la popolo. Sed ne tro multe ĉar la militaro bezonas soldatojn.

Roger Springer

Je via sano, samideano!

Covid19 montris ke viruso estas fleksebla, kaprica, estas antaŭen igita de tre variaj simptomoj. Same kondutas la viruso de zostero. Multaj infanoj de mia generacio kaptis varicelon, kiu ŝajne malaperas post kelkaj tagoj. Sed fakte la viruso neniam foriras. Ĝi "dormas" dum jaroj en ganglioj, elektitaj de ĝi kaj povas reaperi iam ajn.



En mia kazo iun dimanĉon mi sentis je la talio sub la ripoj, je la maldekstra flanko de mia korpo tian jukon, kiu anoncas la aperon de akno. Sed nenio aperis dum la sekvaj ses tagoj. Doloro kaj naŭzo, kiujn mi ne povis rilatigi al io ajn, fariĝis pli kaj pli netolereblaj ĝis mi decidis

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

viziti kuraciston. Li sendis min al hospitalo post injekcio de morfino. Ah morfino, mirakla substanco ! Post la injekcio mi ne plu sentis neceson atingi la hospitalon ! Tie la kuracistoj faris testojn pri kiel eble plej da organoj : pulmoj, renoj, pankreato, stomako. La rezultoj ne kondukis al diagnozo. Mi rehejmiĝis kun skatolo da kontraŭbiotikoj kaj kontraŭdoloraj piloloj .

Finfine sabaton matene kiam mi eniris la banĉambron kaj vidis min en la spegulo , mi ne plu povis dubi : sur la maldrekstra flanko de mia korpo, super kaj sub la talio, la ruĝaj dekoracioj kun flavaj kapetoj tute klare solvis la enigmon . Temis pri zostero .

Se tio okazas al vi tuj kuru al kuracisto por ricevi kontraŭvirusan medikamenton . Ju pli rapide, des pli bone estos la resaniĝo. Je la momento mi alkroĉiĝas al tiu kredo . La fino de la aventuro apartenas al la estonto.

Ĉu mi ankaŭ sciigu vin ke la pli ol 60/65 jaraĝuloj rajtas ricevi vakcinon ? Tio valoras iom da konsidero? Ĉu ne ?

Franciska Toubale



La Manlia Esperanto-Klubo Anoj

kunvenas la unuan kaj trian sabatojn je la 10.30 atm. Unu taso da klubpagota kafo atendas vin. Anoj de la Manlia Esperanta

klubo nun kunvenas sed ni elekas la kafejon laŭ la vetero kaj la sekuro kontraŭ la kronviruso.

Roger Springer



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

La temperaturo pliboniĝas .

Ĉar dum la sendado al Roger elfalis kelkaj gravaj linioj en la 495-a artikoleto, jen ĝi refoje:

KIO ESTAS MONO ?

Roger petas nin diri al li ĉu ni samopinias pri lia klarigo pri mono.

Jam kiam la homoj ankoraŭ ne havis skribitan lingvon, ili iel markis, ke kaj kiom unu homo rajtas ricevi da helpo aŭ laboro de alia persono kiun li helpis antaŭe. Tiu marko ke alia persono ŝuldas al vi laboron estis jam speco de mono. Poste, kiam vi havis skribitan lingvon, vi ricevis skribitan noton dirantan ke vi ricevos en la estonteco helpon aŭ laboron el de la alia persono, kaj kiom. La alia persono donis al vi tiun ŝuldokonfeson, tiun monon. En la kapitalismo oni ĝeneraligis tiujn konfesojn, tiun monon, tiel ke oni povis uzi ilin por “pagi” ŝuldokonfeson al iu ajn. Nuntempe la mono, la pagopromeso, diras ke vi ricevos helpon, laboron, aŭ servon de tiu kiu ricevas vian monon. Per mono vi ricevos iun ajn servon el de iu ajn. Kaj ju pli da mono vi havas, des pli da servoj vi povos ricevi, kaj tio indikas vian “riĉecon”. Mono do reprezentas posedon, kaj normale vi ne fordonas tiun posedon, tiun riĉecon. Kaj kiel do vi povas havi pli da posedo ol aliuloj? Simple pro la (neĝusta) familia sistemo per kiu vi ricevis el de viaj gepatroj pli da posedo ol ricevis aliuloj kaj/aŭ per tio ke vi mem (same kiel faris viaj gepatroj) dum viaj interŝanĝadoj sukcesis ricevi pli da valoro ol valoris via mono, via “helpo”. Konsekvence riĉeco estas klera ŝtelado, speco de lernita kaj lernata profesio aŭ “komerco”. En la kapitalismo, se vi havas pli da mono ol la mezan, tiu ekstra mono do reprezentas ŝtelitan posedon.

Marcel Leereveld.



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

LA KVAR GRAMATIKAJ "VOĈOJ"

La Voĉoj (pli bona termino estus "Aspektoj") ne bezonatas en lingvo, ĉar la bildo de la okazo estas tute la sama en la kvar Voĉoj. Ni devas tamen lerni ilin, ĉar Zamenhof imitis ilin el la eŭropaj lingvoj kaj do la Esperantistoj uzas ilin. Sed vi mem ne bezonas uzi la voĉo-sistemon. Dum la bildo estas la sama en la kvar Voĉoj, la diferencoj estas la manieroj en kiuj la parolanto, kaj do ankaŭ la aŭskultanto, rigardas la bildon. Anstataŭe oni povas uzi nur la bazan tekston, la "Aktivan Voĉon", kaj menciiti la rigardomanieron per alia teksto. Sed se vi uzas la aliajn Voĉojn atentu, ke vi uzu la samajn vortojn kaj la saman verbotempon kiel faras la baza Voĉo, la Aktiva Voĉo.

Kiun ajn Voĉon vi uzas, estu konscia pri la teksto de la Aktiva Voĉo, por uzi la saman originan tekston. Jen kelkaj ekzemploj:

AKTIVA: La sekretario finAS la kunvenon.

PASIVA: La kunveno finatAS de la sekretario. (Zam.: estAS finata).

MEDIALA: La kunveno finiĝAS.

FAKTITIVO: La prezidanto finigAS la sekretarion la kunvenon.

PASIVA: La kunveno finatIS de la sekretario (Zam.: estIS finata).

AKTIVA: La sekretario finIS la kunvenon.

MEDIALA: La kunveno finiĝIS.

FAKTITIVO: La prezidanto finigIS la sekretarion la kunvenon.

P e r f e k t o :

AKTIVA: La sekretario estAS fininta la kunvenon. (= has finished).

PASIVA: La kunveno estAS finita de la sekretario. (= has been finished).

MEDIALA: La kunveno estAS finiĝinta. (= has come to an end).

FAKTITIVO: La prezidanto eatAS finiginta la sekretarion la kunvenon.

P l u s k v a m p e r f e k t o :

PASIVA: La kunveno estIS finita de la sekretario, (had been finished earlier)

AKTIVA: La sekretario estIS fininta la kunvenon. (had finished earlier).

MEDIALA: La kunveno estIS finiĝinta. (had come to an end earlier)

Marcel Leereveld.

LA 19a jara datreveno de AE alproksimas. **unua eldono 20/09/2011**

Post kvar semajoj la 500a eldono estos elsendota.

Skribu al AE dum ĉi tiu grava tempo.

Roger Springer

**3ZZZ**

La elsendo de la 14a de septembro celas klerigi la aŭskultantojn dank'al la prelegoj de Albert Staline Garrido pri "kio estas geografio?" kaj de Xavier Alcalde pri "kio estas geopolitiko?". Ĝi invitas pripensi pri la situacio de la rifuĝintoj en Eŭropo aparte en la kampadejo Moria en Grekujo, kie okazis incendio



Franciska Toubale

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Bonan tagon al vi, anoj de la BES!





Mi tre esperas ke vi bonsanas kaj bonhumoras dum ĉi tiaj malfacilaj tempoj.

Estas t—r—e longa tempo ke ni ne renkontiĝis en monata kunveno sed, dank'al Peter kaj Linda, ni faris la kunvenon de septembro ĉe ili.

La vetero estis bela kvankam tro malpluvema, kaj ni pasigis ĝuan tagon tie en Caboolture. Okazis la kunveno kaj poste ni meztagmanĝis tre bongustajn picojn kun kafo aŭ teo. Tiam Thomas kaj Oskar intervjuis Peter pri lia vivo en Esperanto. La tutan tempon ni povis admiri la belegan ĝardenon de Peter kun multaj aŭstraliaj plantoj kiuj altiras papagojn kaj aliajn speciojn de birdoj. Tre remarkinde estas la orkidoj kiuj floras abunde.

Alia granda interesaĵo estis ke Erhard tre bonkore donacis al ni 2 interesajn monerojn koncerne la faman sed malgloran, Kapitanon Bligh.



Mi kredas ke ĉiuj tre ĝuis la tagon, **Doug Eising**



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE



La 3-an dimanĉon de ĉiu monato 16:00 – 18:00 Sidnej-tempe (UTC+10)



20 septembro 2020

(16:00) **Mia esperantista vivo** – Fama esperantisto [Carlo Minnaja](#) esploras sian tre varian esperantistan vivon kaj ankaŭ aludos al kelkaj ne-esperantistaj partoj.

(17:00) **Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE)** – [Manfred Westermayer](#) el Germanio prezentos la historion, la evoluon, la celojn, atingojn kaj la nunan situacion de AVE.

Plej amike, **Sandor Horvath**



Kiel esprimi sin en Esperanto, eĉ se oni ne scias multajn vortojn

Jen mi montros al vi kiel bonege sin esprimi, eĉ se oni ne mem komprenas multajn vortojn. Ni prenu ekz. la vorton “dento”. Eĉ ne sciante ĝin, oni tamen, kaj facile, povas esprimi sin sen tiu vorto, kaj, kompreneble ankaŭ sen aliaj vortoj! Jen vidu:

Mia falsa maĉomaŝino estis perdinta unu el siaj maĉiloj. Tio igis ĝin gliti de flanko al flanko ene de mia maĉomaŝinujo. Unu flanko de la falsa maĉomaŝino estis iomete pli akra ol la alia. Tio kaŭzis ke la maĉilkarno en la dekstra flanko de mia maĉomaŝinujo estis treege vundita de la falsa maĉomaŝino.

Mi do iris al mia maĉomaŝinisto, kiu riparos la tutan falsan maĉomaŝinon por mi. Nun ĉio estas en tute bona ordo, mi ne plu suferas dolorojn ie ajn en mia tuta maĉomaŝinujo!

Amike **Bob Felby**



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE